



### BEL 78-JARA: HIERAU, HODIAU KAJ MORGAU

Jam estas tre malproksime tiu tago kiam la brazilaj esperantistoj kunvenantaj en Rio de Janeiro, okaze de la 1-a Brazila Kongreso de Esperanto, decidis fondi "Brazila Ligo Esperantista".

Estis la 21-a de Julio 1907 kaj la kvina numero de "Brazila Esperantisto" informis al ni jene: "Oni fondis Brazilan Ligon Esperantistan kies definitiva regularo estas la jena:

Art. 1-a - Estas kreita la "Brazila Ligo Esperantista". Societoj kaj grupoj donos al ĝi kvin po cent (50%) ilia enspezo, do negrupanoj pagos ĉiujare 5\$000.

Art. 2-a - La "Estraro" de la Ligo formiĝas el: unu prezidanto, unu sekretario kaj unu kasis to; plie estos "Komitato Konsila" el tiom da delegitoj kiom da grupoj aliĝintoj. La sidejo de l'Estraro estas Rio de Janeiro. Ĉiu kongreso elektos l'Estraron.

Art. 7-a - La delegitoj de l' grupoj, kiuj konsistigas la komitaton konsilan estos elektataj de l' grupoj, inter kiuj kaj la Ligo ili estos la peruloj."

Do, kiel ni povas konstati, ekde siaj plej fruaj tempoj, BEL havis federacian bazon. Tiu sama principo ripetiĝas en la nuna Statuto, kie oni povas legi, en artikolo l-a ke "BEL celas kunigi la Esperanto-instituciojn en Brazilo, kaj kunlabori kun ili". Krome ankaŭ en artikolo tria, paragrafo sepa, "aliĝinta asocio estas tiu, kiu post akcepto de ĉi tiu Statuto kaj kun sia propra aprobita de la Ligo, aligis al ĉi tiu ĉiujn siajn anojn".

Dum longa tempo, BEL funkciis kiel ununura organizaĵo de la brazila esperantistaro. Sed, kiel iu ajn organizaĵo, BEL, en difinita momento, trapasis krizan periodon. Oni ne plu estis kontentaj pri ĝia agado kaj pri ĝiaj gvidantoj. Kaj, tiam, kion oni faris? Anstataŭ solvi la problemon interne de la organizaĵo mem, per la ŝanĝo de ĝiaj gvidantoj aŭ devigi tiujn agi pli komformaj al la dezirindeco de la membraro, oni preferis eksteran solvon kaj fondis aliajn organizaĵojn. Malgraŭ tio, la problemo ne kontentige solviĝis, kiel oni poste povis konstati.

Dume, BEL superis la krizan periodon kaj, iom post iom, revenis, denove, al ĝenerala kontentiga funkciado.

Hodiaŭ, BEL havas ampleksan laboragadon, kiun ni povas resumi jene:

- ĝi liveras al la brazila esperantistaro ĉion kion ĝi bezonas por disvastigi esperanton, tio estas, prospektoj, afiŝoj, lernolibroj kaj vortaroj;

(daūrigas)

#### KULTURKUNVENOJ EN LA SIDEJO DE BEL - PROGRAMO POR AŬGUSTO/85

- 03/08 Prelego de S-ano José Bonifácio Leite pri la temo "ESPERANTO, LA LATINA KAJ LA PORTUGALA"
- 10/08 VARIA KUNVENO (informoj, poezio, muziko, anekdotoj, skeĉoj, vortludoj ktp ...)
  17/08 Prelego de S-ano Jeremias Santos pri la temo "TEORIO DE LA KOLORO" (kun prezentado de diapozitivoj)
- 24/08 VARIA KUNVENO
- 31/08 Prelego de S-ano Paulo Sérgio Viana pri la temo "STREĈIĜO MODERNA PROBLEMO"
  - \* Ĉiuj kunvenoj komenciĝas je la 16-a horo \*

DEFT THITOTHES/ JATTO OF

- ĝi regule publikigas tri periodaĵojn: "Esperanto-noticias" (monata portugallingva informilo pri esperanto), "BEL-informas" (monata bulteno en esperanto kun novaĵoj pri BEL kaj pri la bra zila movado) kaj "Brazila Esperantisto" (kvaronjara tradicia revuo);
- ĝi funkciigas korespond-kursojn en kvar niveloj (baza, progresiga, supera kaj por-instruis ta), kiuj varbas lernantojn el la tuta lando;
- ĝi funkciigas libroservon, ĉiutage pli aktualigita , kiu disponigas al la interesitoj enlandajn kaj eksterlandajn verkojn;
  - ĝi aŭspicias Brazilajn Kongresojn de Esperanto, kune kun BKE kaj KKE;
- ĝi peradas aliĝojn por UEA kaj abonojn por HEROLDO DE ESPERANTO, EL POPOLA ĈINIO, SIMPOZIO kaj INTERNACIA KOMPUTADO.

Tamen, malgraŭ tio, venas, lastatempe, el diversaj landpartoj, plendoj kaj premoj por ke "BEL prenu federacian strukturon ĉar kontraŭe oni entreprenos la fondon de alia organizaĵo surbaze de tiu principo".

Ŝajnas al ni ke, denove, iamaniere, la historio ripetiĝas, ĉar anstataŭ uzi internajn rimedojn por atingi la deziratan celon, oni minacas per nova ekstera solvo. Kial, ekzemple, ne uzi la Statuton de la Ligo por enkonduki la necesajn ŝanĝojn en ĝi? La artikolo 18-a tekstas jene: "Ĉi tiu Statuto povos esti reformita nur en Ĉenerala Kunsido, ĉu ordinara, ĉu eksterordinara". Aŭ se oni opinias ke tiuj ŝanĝoj estas ne-necesaj, kial ne profiti la okazon por kandidatiĝi al la gvidado de la Ligo por la oficperiodo 1986-1989, prezentante kiel platformon la praktikan apli kadon de la federaciaj principioj de la Statuto?

Ŝajnas al mi, ke nur agante tiel kaj evitante novajn deflankiĝojn kaj seniluziiĝojn, ni povos, post du jaroj, ne nur festi harmonie la Centjaran Jubileon de Esperanto, sed ankaŭ fieri pri la 80-jariĝo de unu el la plej malnovaj esperanto-organizaĵoj en la mondo.

Aloisio Sartorato COJIGA KONSTATO: EN JUNIO, NIA MEMBRARO/85 JAM SUPERAS NIAN MEMBRARON 84!

Stato	je	la	30/06	/85
-------	----	----	-------	-----

STATO	M-S	M-l	M-2	Entute D-M	В-М	ENTIT TITLE
AC AM PA AP RO RR	01 ( -) 01 ( -) 04 (02) - ( -) - (o1) - ( -)	- (-) - (01) 01 (-) - (-) - (-)	- ( -) - ( -) 01 (01) - ( -) - ( -)	01 (-) - (-) 01 (01) - (-) 06 (03) 01 (-) - (-) - (-) - (01) - (-) - (-) - (-)	- ( -) - ( -) - ( -) - ( -) - ( -)	O1 (-) 01 (01) 07 (03) - (-) - (01) - (-)
Nordo	06 (03)	01 (01)	01 (01)	08 (05) 01 ()	- ( -)	09 (05)
MA PI CE RN PB PE AL SE BA	01 (01) - ( -) 01 (03) 01 (01) 06 (04) - (05) 03 ( -) - (01) 15 (05)	- ( -) - (01) 01 (02) 01 ( -) - (01) 05 (03) 01 (02) - ( -) 10 (07)	- ( -) - (01) - (01) - (01) - (-) - (-) 01 (-) - (-) 03 (02)	01 (01) - (-) - (01) - (-) 02 (06) 01 (01) 02 (02) - (-) 06 (05) - (-) 05 (08) 01 (01) 05 (02) - (-) - (01) - (-) 28 (14) 01 (01)	- ( -) - ( -) - ( -) - ( -) - ( -) - ( -) - ( -)	01 (01) - (01) 03 (07) 02 (02) 06 (05) 06 (09) 05 (02) - (01) 29 (15)
Nordor.	27 (20)	18 (16)	04 (04)	49 (40) 03 (03)	- ( -)	
ES MG RJ SP Sudor.	06 (02) 58 (29) 99 (126) 47 (47) 210 (204)	- (01) 11 (18) 55 (60) 27 (32)	- (01) 02 (01) 12 (13) 01 (03)	06 (04) - (-) 71 (48) 05 (02) 166 (199) 24 (21) 75 (82) 08 (05)	- ( -) - ( -) 03 (03) 01 (01)	52 (43) 06 (04) 76 (50) 193(22 <b>3</b> ) 84 (88)
		93 (111)	15 (18)	318 (333) 37 (28)	04 (04)	359 (36 <b>5</b> )
PR SC RS	53 (50) 01 (05) 03 (08)	07 (05) 01 (02) 06 (08)	01 ( -) - ( -)	61 (55) 02 (02) 02 (07) - (-) 09 (16) - (-)	- ( -) - ( -) - ( -)	63 (57) 02 (07) 09 (16)
Sudo	57 (63)	14 (15)	01 ( -)	72 (78) 02 (02)	- ( -)	74 (80)
DF GO MT MS	08 (07) 04 (01) 01 (01) - (01)	04 (02) 02 (02) - ( -) - ( -)	- ( -) 01 ( -) 01 ( -) - (01)	12 (09) 02 (01) 07 (03) - (-) 02 (01) - (-) - (02) - (-)	- ( -) - ( -) - ( -)	14 (10) 07 (03) 02 (01) - (02)
04134134134134134134134134134134134134134	. 13 (10)	06 (04)	02 (01)	21 (15) 02 (01)	- ( '-)	23 (16)
BRAZILO	313 (300)	132 (147)	23 (24)	468 (471) 45 (34)	04 (04)	517 (509)
Mallongi	goj: M-S/N	Membro-simp	patianto: M-	-1 /Membro 1. M-2. Mombro	- 2 - 5 - 4 - 5	(555)

Mallongigoj: M-S/Membro-simpatianto; M-1/Membro 1; M-2:Membro 2; D-M/Dumviva Membro; B-M/Bonfarinta Membro (Parenteze: membraro 84)

### MALLONGE ... PRI LA BRAZILA MOVADO

"RADIO ROQUETTE PINTO" INFORMAS PRI ESPERANTO - La 28-an de Majo, S-ano José Rabello de Paula telefonis al la programo JORNAL DA MANHÃ, dissendata, ĉiutage, pere de "Rádio Roquette Pinto", en Rio de Janeiro, kaj, dum kvin minutoj, dialogis pri esperanto kun la raportistoj Ricardo Bueno kaj Pery Cota. Poste, la 25-an de Junio, en tiu sama radistacio sed en alia programo (Momento Musical), dissendata, ĉiutage, de la 14-a ĝis la 15-a horo, li dediĉis muzikon al la esperantistaro de Rio de Janeiro kaj, tiam, li profitis la okazon kaj propagandis pri la internacia lingvo, denove.

PRELEGO PRI ESPERANTO EN LERNEJO "ALMIRANTE BARROSO", EN RIO DE JANEIRO - Daŭras regule la informlaboro farata de S-ano José Rabello de Paula ĉe la oficialaj lernejoj de kvartalo Tijuca, en Rio de Janeiro. La 17-an de Junio, tiu samideano prelegis al 80 personoj ĉe Lernejo "Almirante Barroso". Krome ankaŭ li okazigis tie ekspozicion pri esperantaĵoj kaj disdonis propagandilojn al la lernejanoj kaj instruistoj.

#### ESPERANTO-INSTRUADO

ESPERANTO-KURSOJ ĈE UNIVERSITATO DE SÃO CARLOS - Danke al la informlaboro de nia Samideano Aristophio A.A. Filho, kiu fotokopiis ekzemplerojn de Esperanto-Noticias kaj afiŝis ilin tra la Universitato, funkcias, nuntempe, sub lia gvido, du Esperanto-kursoj por studentoj kaj profesoroj de "Escola de Engenharia de São Carlos".

INTENSIVA ESPERANTO-KURSO ĈE USEERJ - La 1-an de Majo, pli ol 50 personoj partoprenis en la seshora intensiva Esperanto-kurso, gvidita de S-ano Sylla Chaves, en la sidejo de "União das Sociedades Espíritas do Estado do Rio de Janeiro" (laŭ "Correio Fraterno", junio 85).

KURSFINIĜO EN ALTO PARAÍSO, GOIÁS - Laŭ informo aperinta en "Tagiĝo" 01/85, S-ano Valdemir Moreira gvidis elementan kurson de Esperanto, en Alto Paraíso, Goiás. Ĝin partoprenis 51 lernantoj de la urba gimnazio, kie okazis la kurso.

KURSO EN LERNEJO DE PAVUNA - S-ano Luiz Dias Pita, kiu respondecas pri la Koresponda Servo de E-Grupo I.G.Braga, sukcesis starigi E-klason ĉe ŝtata Lernejo André Fontes Peixoto, en kvarta-lo Pavuna, en Rio de Janeiro.

INTENSIVA ESPERANTO-KURSO EN JUNDIAÍ, SÃO PAULO - De la 1-a ĝis la 23-a de Julio, okazos, ĉe Kultura Centro de Jundiaí, Rua Barão de Jundiaí 109 -19 andar, intensiva kurso de Esperanto, sub la gvidado de S-ano Roberto Gomes de Freitas. Ĉe la fino, la 26-an de Julio, oni aljuĝos diplomojn al la kursfinintoj (Laŭ "Oficio 630/85, de Prefeitura Municipal de Jundiaí").

ESPERANTO-KURSOJ EN BRASÍLIA - Esperanta Asocio de Brasília organizas, nuntempe, kvar Esperanto-kursojn: tri bazajn, gvidatajn nespektive de S-anoj Widal Cunha, Leticia Polisseni kaj Neima Adorno, kaj unu progresigan, gvidatan de S-ano Roberto Vieira Resende. En ĉiuj klasoj, ekde la komenco, oni parolas nur en esperanto. Enmatrikuliĝis 26 personoj, en la elementa, kaj 10, en la progresiga (Laŭ "Tagiĝo" 01/85).

150 PERSONOJ LERNAS ESPERANTON EN GAMA, DF - S-ano Josias Ferreira Barbosa gvidas elementan kurson de Esperanto en lernejo de tiu satelita urbo de Brasília: ĉirkaŭ 150 lernantoj el lia angla klaso enskribiĝis. (Laŭ "Tagiĝo" 01/85).

#### DIVERSAJ

NOVA ESTRARO ĈE "ESPERANTO-SOCIETO DE PORTO ALEGRE", RS - Per Cirkulero de la 27-a de Majo, E-Societo de Porto Alegre komunikis al ni la elekton de nova estraro por la oficperiodo 1985/87, sub la prezidanteco de S-ano Ivo Sanguinetti.

AMAZONIA ESPERANTISTA ADRESARO 01/85 - Antaŭ nelonge, aperis la unua eldono rilata al 1985, de tiu utila adresaro, kun 88 adresoj en 12 urboj.

KULTURA SEMAJNO EN BRASÍLIA - De la 22-a ĝis la 28-a de Julio, okazos, en Brasília, sub la aŭspicio de Esperanta Asocio de Brasília, Kultura Semajno. En la programo, estas kurso pri "La arto traduki en/el Esperanto (n)", gvidota de S-ano Leopoldo Knoedt, kaj esperantologiaj prelegoj de S-anoj Carlos Lima Melo, Valdemir Moreira, Nelson Pereira de Souza kaj Roberto Passos Nogueira. Pliaj informoj ĉe EAB, Caixa Posta 11-1124, 70084-BRASÍLIA, DF.

FONDITA ESPERANTO-GRUPO EN CAMPO GRANDE, MATO GROSSO DO SUL - Laŭ informo ĵus sendita al ni, fondiĝis en Campo Grande, Mato Grosso do Sul, Esperanto-Grupo, kies titolo estas "Grupo Esperantista Nova Luz". Nuntempe, naŭ samideanoj kunvenas, ĉiusabate, de la 07h30m ĝis la 09h30m, kun la celo perfektiĝi en la uzado de la internacia lingvo. La nova Grupo petas ĉies helpon kaj la adreso por kontakto estas Caixa Postal 883, 79.100-CAMPO GRANDE, Mato Grosso do Sul.

EAB HAVAS 45 MEMBROJN - Laŭ informo publikigita en "Tagiĝo 01/85", Esperanto-Asocio de Brasilia havas, nuntempe, 45 membrojn. Tamen, la nuna estraro, ne kontenta pri tiu cifero, malgraŭ ke ĝi estas pli alta ol en antaŭaj jaroj, entreprenas kampanjon cele al 250 membroj ĝis oktobro ĉi-jare.

NOVA ESTRARO ĈE CAMPOS ESPERANTO-KLUBO - La pasintan aprilon, estis elektita nova estraro de Campos E-Klubo (Rua Ten-Cel Cardoso 821, Campos, RJ), sub la prezidanteco de S-ano Joel Maciel Soares.

## MALLONGE ... PRI LA INTERNACIA MOVADO

ESPERANTISTOJ POR LA PACO, EN AŬGSBURG - Krom ankaŭ la tradiciaj eroj de ĉiuj Universalaj Kongresoj, oni programis por Augsburg tutnovan kunvenon nomitan "Tago de Paco". La programo antauvidas specialan kunsidon gvidotan de Vic-Prezidanto de UEA, Yosimi Umeda, eldonon de broŝuro pri la evento, disdonota al la kongresanoj, ekspozicion ligitan al la temo kaj prezentadon de la teatraĵo "La Pacludo". Ĝis meze de majo, aliĝis al la Kongreso 1683 personoj (Laŭ "Kvina Oficia-

POEZIA KONKURSO "INTERNACIA AMIKECO" - Estas organizata de Triesta Esperanto-Asocio (via Trento 1, I 34132 TRIESTE, Italio), okaze de la Semajno de Internacia Amikeco 1986, poezia konkurso por poemoj verkitaj rekte esperantlingve. La temo estas libera kaj limdato por sendado estos 31.08.85, en kvar kopioj: unu havanta la nomon kaj la adreson de la verkinto por la sekretariino, D-rino Ariella Colombin (via Alfonso Valerio 85, I 34128, TRIESTE, Italio) kaj la aliaj tri, sennomaj, por la juĝ-kritikistoj (Aldo de Giorgi, Piergiorgio Scranzo, Mauro Nervi) al la adreso de la Asocio. Ĉiu aŭtoro povos prezenti unu poemon. Ĉio estu tajpita klare kaj legeble. Eventuale, la pœtoj kunsendu biografieton. Por pliaj informoj,kontaktu Jorge das Neves, en Rio de Janeiro (telefonnumero: 237-2211), unu el la gajninto de pasintjaraj konkursoj..

REVUO "VELO" PUBLIKICAS ARTIKOLON VERKITAN DE BELMONTE DE ABREU - La nov/decembran numeron de la revuo VELO, eldonita de Vojvodia E-Ligo kaj kies cefredaktoro estas Tibor Sekelj, publikigis artikolon verkitan de S-ano Modesto Belmonte de Abreu, el Porto Alegre, RS. La titolo de la artikolo estas "La plej aĝa brazilano" kaj temas pri la murpentraĵoj eltrovitaj de la franca arkeologo Jean Perié, en la groto Morro Só, en Rondonópolis, ŝtato Mato Grosso.

## GENERALA ORDINARA KUNSIDO DE BEL

La 29-an de Junio, laŭ programite, okazis, en la sidejo de BEL, Ĝenerala Ordinara Kunsido, kun la ĉeesto de 15 membroj. La Kunsido komenciĝis akurate je la 16-a horo kaj finiĝis je la 18-a.

- aprobo de la Protokolo de la antaŭa Ĝenerala Kunsido;

- prezentado kaj aprobo de la Estrara Raporto rilata al 1984;

- same, pri la Financa Raporto kaj Bilanco;

- elekto de S-ano Victor Sadler, kiel anstataŭanto de Komitatano Sylla Chaves, en la Komitat-Kunsidoj de la Aŭgsburga Kongreso;

- elekto de S-anino May Bijeleveld kiel reprezentanto de BEL, okaze de la salutoj de landaj asocioj en tiu sama Kongreso;

- same, en la Seminario pri Gvidado kaj Informado, okazonta antaŭ la UK;

- ŝanĝo en la dato de la balotado por la nova estraro de BEL, de 26-a de oktobro al 7-a de decembro, kiel difinas la Statuto;

- komisio al S-ano Jorge das Neves por redakti Regularon pri la Balotado;

- prezentado de la prezidanta sinteno, rilate al la nunaj problemoj de la brazila e-movado.

Pliaj detaloj aperos en venonta BRAZILA ESPERANTISTO.

# PREZIDANTO DE BEL VIZITAS BELO HORIZONTE

De la 16-a ĝis la 18-a de majo, Fernando Marinho, la prezidanto de BEL, vizitis Belo Horizonte. Tie, li havis okazon kontakti kaj interŝanĝi ideojn pri la movado kun la tieaj samideanoj. Unue, li vizitis Belorizonta E-Asocio, kie li konstatis la progresojn rilatajn al la laboro por la 21-a Brazila Kongreso de Esperanto. Poste, li vizitis "Sociedade Mineira de Esperanto" kaj fine, prelegis al centoj da esperanto-lemantoj ĉe "União Espírita Mineira".

# CEL ELDONAS NOVAN PROSPEKTON

BEL jus eldonis novan prospekton portugallingve nomitan "A Realidade do Esperanto", kiu enhavas objektivajn informojn pri la internacia lingvo kaj ankaŭ opiniojn de diversaj brazilaj kaj eksterlandaj gravuloj pri esperanto. La prospekto jam estas mendebla kaj la prezo estas 0,35 ORTN.

VIZITOJ AL BEL, EN JUNIO - Paulo B. Novaes kaj Gléssia M.P. de Castro Novaes, el Vitória, ES (22/06).

DIPLOMOJ LIVERITAJ, EN 1985 (ĝis la 30/06) - Baza: 30; Progresiga: 10; Supera: 01.

ELDONITAJ DOKUMENTOJ EN 1985 (ĝis la 30/06) - Enspeznotoj: 646; Rembursaj enspeznotoj: 077; Fakturoj: 044; Leteroj: 124.

ALIĜOJ AL UEA, EN 1985 (ĝis la 30/06) - MJ: 11; MA: 82; MJ-K: 01; MA-K: 05; Entute: 99.

ABONOJ EN 1985 (ĝis la 30/06) - El Popola Ĉinio: 45; HEROLDO: 31; KONTAKTO: 12; IK: 16.

BEL informas/julio 85 \* Respondeca Redaktoro: Aloisio Sartorato \* Eldonkvanto: 1.500 ekz.